Belega, lukse aranĝita, Kulturdomo de profesiaj sindikatoj enkondukis en sian kultur-klerigan laborplanon la instruadon de Esperanto. Al ĉiuj fabrikoj kaj fakorganizoj oni dissendis invitojn pri Esperanto-kurso por iliaj membroj.

La solena malfermo de la kurso okazis la 15.2.49 antaŭ tutplena salono. La direktoro de la Kulturdomo prezentis Prof. Sygnarski, lektoron de E. ĉe la Jagellona Universitato, kiu prelegis pri E. kiel plej perfekta interkomprenilo, ĉar E. estas, krom lingva problemo, ankaŭ potenca socia faktoro kaj simbolo de la tutmonda solidareco.

Por pruvi la praktikan utilecon kaj facilecon de Esperanto, S-ano Pioprowski, invitite de la preleganto, rakontis en la internacia lingvo kiel li fariĝis Esperantisto, instigante ĉiujn ĉeestantojn al diligenta lernado.

Tiel enskribiĝis pli al 60 personoj por la kurso, kiu daŭros ĝis la mezo de junio; post ĝi, ĉiu sukcesinta lernanto ricevos diplomon.

Oni sendu gratulet., il. poŝtk., gazetojn kaj aliajn esperantaĵojn al: DOM KULTURY Związkow Zawodowych, Krakow, Rynek Główny 27. Ĉiu ricevos respondon ĉe la kursofano en junio!

XIV-a Kongreso FL.L.E. GENT, 4-6 de junio 1949

KVINA KOMUNIKO

La konsisto de la Komitato: Ges-anoj Drs Mortelmans, Van Neste, Terrijn, D'Hainaut, Van Halter kaj De Boes. Skribu al: S-ano De Boes, Clementinalaan 31.

Pagu al: S-ano Van Halter; St. Michielsplein 8 — Poŝtĉekkonto, n° 4832.56

Kongreskotizo: 50 Fr. po persono. Ni insiste petas ke tre multaj jam nun faru la ĝiron al S-ano Van Halter.

Ghumarkoj kongresaj: ili estas haveblaj je 20 Fr. por 100. Nepre mendu tuj kvanton: vi propagandu Esperanton, gluante ilin sur viajn korespondaĵojn; vi konigu nian kongreson kaj... subtenu la laboron de la O.K., plenigante ĝian kason!

Apartaj kunsidoj: Tiucele la L.K. povas disponigi ejojn (ekz. por F.E.I., UEA, instruistoj ktp). Oni jam nun turnu sin al la sekretariejo.


GENT KAJ ĜIA HAVENO.

Gent, estante la dua belga haveno, estas en komuniko kun la Norda Maro per belega markanalo de 32 Km. La akvosurfaco mezuras 800 Ha. kaj havas 32 Km. da kajoj kaj bordoj.

Gent estas konata speciale pro sia transŝargado de prezegaj kaj nepakitaj varoj.

Ĝia ilaro tial estas ekzemplo tiucele.

La dokoj estas larĝaj kaj vastaj kaj iliaj arangoj permesas, eĉ al la plej grandaj transportŝipoj, facilajn kaj rapidajn moveblojn.



La nombro de la levilegoj estas 160 kaj ilia levpovo estas de 2,5 ĝis 250 Tunoj.

Tiu moderna kaj perfektigita ilaro estas unu el la plej gravaj faktoroj de la prospero de la Genta haveno. Pro tio ĝi havas la nomon de « rapidhaveno ».

La interlando de la haveno estas tre vasta; ĝi etendiĝas sur la plej industriaj kaj la plej loĝataj partoj de l' okcidenta Eŭropo kaj krome ĝi estas la belga industria haveno.

Multegaj fabrikoj instaligis tuj proksime al ĝi kaj al la mara kanalo.

Bedaŭrinde la haveno ankoraŭ suferas diversspecaj limigojn, pro militaj postsekvoj kiuj kontraŭstaras la normaligon de la komercaj rilatoj.

Plie la konstruo de pli granda kluzo en Terneuzen estas necesega por ke pli grandaj ŝipoj venu ĝis Gent.

Malgraŭ tiuj malfavoraj cirkonstancoj ŝipegoj de trideko da diversaj landoj jam senŝargiĝis dum la lastaj jaroj, kaj la trafiko kreskos sekve de ĉiaj plibonigoj, kiuj faciligos la atingon de la haveno kaj la transbordigon.

AFDELINGEN V.E.B.

Antwerpen:	Mej. Hofkens H., Gummarustr. 21, Antwerpen.
Blankenberge:	Marmenout A., 24, Malecotstraat, Blankenberge.
Brugge:	Iserant R., Stwg op Blankenberge, 72, Brugge.
Brussel:	Sutterman A., Opzichterstraat, 87, Molenbeek-Brussel.
Gent:	Vandevelde A., Buffelstraat, 3, Gent.
Mechelen:	Willems F., Leuvense steenweg, 88, Muizen.
Oostende:	Vanthourout W., Christinastraat, 57, Oostende.

VERTEGENWOORDIGERS V.E.B.

1. Aalst:	Mej. P. De Cock, P. Couckestraat, 2.
2. Beervelde:	R. Acke, Brandstraat, 23.
3. Bosvoorde:	Rt. Loeckx, Konijnenperken, 107.
4. Heist-op-den Berg:	Fr. Luyten, Bergstraat, 93.
5. Jabbeke:	C. Toussaint, Statiestraat.
6. Kortrijk:	G. De Brouwere, Magdalenastraat, 29.
7. Leuven:	F. Piot, Dietsestraat, 118.
8. Overpelt:	J. Steegmans, Fabriekstraat.
9. Ronse:	J. Cantaert, Geeraardsbergestraat, 144.
10. Rumbeke:	A. Van Leuven, Roeselarestraat, 41.
11. Sijsele-Donk:	R. Jurion, Verpleegster, Sanatorium.
12. St. Pieters-Leeuw:	Monnaers M. C., Walkierstraat, 49.
13. Turnhout:	R. Meyvis, Prinsenstraat, 50.
14. Veurne:	Mej. M. J. Top, Nieuwstraat, 12.
15. Welle:	J. Houtman, Kapellestraat, 16.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — Afdeling Antwerpen. — Op 12 Maart gaven we een bal in ons gewoon lokaal. Vrienden van onze afdeling uit Antwerpen en omliggende, uit Brussel en Mechelen waren bij die gelegenheid opgekomen. Allen beleefden een genoegelijke avond en het feest mag zeer geslaagd genoemd worden. Boven de ingang van ons lokaal is nu de lichtbak geplaatst met de woorden Esperanto en V.E.B. Antwerpen. Het licht gaat aan en uit en reeds van verre wordt de aandacht hierdoor getrokken, zodat het een uitstekend propagandamiddel geldt.

V.E.B. — Afdeling Brugge. — De cursus is ten einde gelopen en een tweektal weken komen de nieuwelingen naar de werkvergadering. Er dient genoteerd dat 15 cursisten de lessen volgden tot het einde. Onze afdeling verliest een zeer verdienstelijk lid door het heengaan — om beroepsredenen — van Mej. R. Jurion. Het feest, toneel, zang, muziek, dat wij voor de ouders van onze leden inrichtten kende een ongehoord succes. Eens te meer was onze propagandist de ziel der ganse inrichting.

V.E.B. — Afdeling Mechelen: Onze afdeling was flink vertegenwoordigd op het E.-feestje te Antwerpen. Verder ge-

regeld vergadering ten huize van de Voorzitter. Eerstdaags loopt ook de stadscursus ten einde. Het afdelingsleven is nog steeds gekenmerkt door de studie van La Verda Koro, die over korte tijd een einde zal nemen; dan zullen, met het oog op de reis naar Helsingör, speciaal spreekoefeningen doorgaan.

V.E.B. — Afdeling Oostende: Op de laatste vergadering werd de reis naar de Nederlandse tulpenvelden besproken; de Nederlandse hoofdstad zou bij dezelfde gelegenheid bezocht worden. De reis gaat definitief door op 1 en 2 Mei e.k.

De eerste jaarcursus loopt ten einde zodat vanaf volgende maand ons informatieblad in het Esperanto zal verschijnen.

V.E.B. — Afdeling Rumbeke: Onze vertegenwoordiger S-ano Van Leuven A. is werkelijk onvermoeibaar. Na de cursussen in Roeselare die met 60 leerlingen eindigden, werden onder zijn leiding nieuwe cursussen ingericht te Izegem en te Torhout met resp. 12 en 10 deelnemers. Wij verwachten daarom voor onze Bond de aanwinst van vele nieuwe leden in het Westvlaamse.

De Pers over Esperanto

In de periode van einde Januari tot begin Maart vonden wij in de pers wat volgt:

Aankondiging van spreekbeurten in Esperanto:

1. «Mijn eerste stappen in Esperanto» in Het Volk; De Roode Vaan; La Lanterne; Nieuwe Gids; Nation Belge; Dernière Heure.

2. «Vrolijke Vertellingen» in Le Soir; De Roode Vaan; La Lanterne; La Dernière Heure; Le Peuple.

3. «Guido Gezelle» in Le Soir; Le Peuple en De Roode Vaan.

4. «Reis naar Indië» in Le Soir en La Lanterne.

5. «Bestaat er Rechtvaardigheid» in Le Soir; De Roode Vaan; La Lanterne; Volksgazet en La Dernière Heure.

Mededelingen betreffende

Esperanto en/of de beweging

«Labourpartij en Esperanto» in La Nouvelle Gazette de Bruxelles.

«Unesco en Esperanto» in Le Peuple; De Standaard; Gazette de Liège; Le Travail; La Nouvelle Gazette de Bruxelles; La Métropole; La Meuse.

«Esperanto en het onderwijs» in Vooruit.

«Petitionnement, voor Esperanto, aan de U.N.O.» in Vooruit.

«Esperanto-Press en de U.N.O.» in Het Nieuwsblad, De Roode Vaan en De Standaard.

«Een grondwet in Esperanto» in De Roode Vaan en De Nieuwe Gazet.

«Esperanto aan de Universiteit in Cuba» in Le Cheminot (Bern).

«Esperanto op Ysland» in De Gente-naar.

Esperanto Rubrieken

In 3 verschillende nummers van De Roeselaarse Weekbode een uitgebreide rubriek met cursus.

Eveneens in verschillende Zwitserse nieuwsbladen o.a. Zurichse Zeitung; «Eisenbahn»; «Neue Berner Zeitung» en in het landelijk blad «De Natuurvriend».

Aankondiging van het Vlaams Esperanto Kongres te Gent in De Standaard.

Werkvergaderingen-aankondigingen in De Roode Vaan (4 maal); Nieuwe Gids; Le Soir (2 maal); La Lanterne (2 maal); Le Peuple; Le Drapeau Rouge.

Uitgebreide artikels

«Een pionier van Esperanto» nopens het afsterven van E. von Wahl in de «National Zeitung».

«Die Weltsprache Esperanto» in Die Neue Zeit.

«Op het Internationaal Esperanto-kongres te Malmö» verslag door een blinde deelnemer in «Schweizerischer Blindenbote».

GERMANUJO

La Verein Schleswig-Holsteinischer Briefmarkensammler, Rendsburg (Unuigo de S.H. poŝtmark-kolektantoj) aranĝos la 23/24 de aprilo Poŝtmark-Ekspozicion, pri la ebloj kaj manieroj de kolektado. La Esperanto-fako de la unuigo partoprenos kaj prezentos ĝiajn sukcesajn rezultojn. Multaj let., il., pk., filatelele afrankitaj, estas propagandeele nepre atendataj. Ĉiu sendinto ricevos bildpoŝtkarton pri la malnova Rendsburg kun E.-teksto kaj speciala poŝtstampo de la ekspozicio, kie funkcios speciala poŝtoficejo. Festlibreto kun artikolo en la germana kaj Esperanta pri «Filatelio kaj E. estas ricevebla kontraŭ tri resp. kup. Peranto: K. Götze, Mühlenstr. 6, (24 b) Büdelsdorf-Rendsburg, Germanujo, brita zono.

Libro «La plej humoraj anekdotoj kun karikaturoj, estos baldaŭ eldonata. Ĉiuj estas petataj ensendi ian anekdoton aŭ ŝercaĵon (aŭ pli), aldonante du resp. kup.: tiam ili tuj, post la apero, ricevos la unuan eldonon.

Notu ke la plej bonaj ŝercaĵoj estos premiataj per libroj el la Esperanto-literaturo.

Nepre skribu al: Sepp Hönig, (20 b) Bad Harzburg, Haus Mansfeld, brita zono de Germanujo!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

La PREMION gajnis post n-roj 57-58: s-ino De Kersgieter, el Brugge (113 p).

SOLVOJ.

N-ro 59. HOR. 1. kutim; novaj. — 2. aro. — 3. kares; vetur. — 4. tru. — 5. orelo. — 6. abel; pomo. — 7. nur; pup; vin. — 8. silab. — 9. faden; somer. — 10. tri. — 11. rondo; valiz.


VERT. 1. kakt; an; for. — 2. ebura. — 3. tort; er; don. — 4. ol; se. — 5. maestr; pinto. — 6. regul. — 7. novul; pasiv. — 8. op; ho. — 9. vitr; ov; mal. — 10. amike. — 11. juri; on; roz.

N-ro 60. Bankiero; oleandro (el: ledo+rano: eraro mia); jubileo, aparteni, neŭtrala, tradicio, aventuro, hipoteko, uniformo; nostalgio; diligenta; ordinara; najtingalo; eventuala; magazeno; oficiala; reputacio; diktatoro; aŭtentika; sugestii. Bojanta hundo ne mordas.

N-ro 61: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 2. per ĝi oni reklamas; tiam estas mallume. — 3. mallonga skriba rimarko (R). — 4. aldoni fremdan teritorion al regno (R); kaŭĉuko estas tia (R). — 5. konjunkcio; grupo (R). — 6. disponigi al iu ion redonatan (R). — 7. trinkvazo (R). — 8. sinsekvo da personoj metitaj unu apud la alia, laŭ unu linio; percepti odorojn (R). — 9. veturigisto havas ĝin (R). — 10. oni portas ĝin ĉirkaŭ la fingro; per ĝi oni fiksas ŝipon. — 11. ridindigi iun (R).

Vertikale. 1. fumanto uzas ĝin (R); moviĝanta kaj interpuŝiganta amaso (R). — 2. parenco (R). — 3. ĝia larvo manĝas stofojn (R); fari en gazeto mallongan kritikan raporton pri iu verko (R). — 5. samopini (R); marmalsanuloj tion faras (R). — 6. supera parto de la homa korpo (R). — 7. volonta atento (R); involvi objekton en papecon por facile kunporti ĝin (R). — 9. tranĉa; kliniĝanta for de la vertikala direkto (R). — 10. bonfarto (R). — 11. korparto (R); ido de eŭropaj gepatroj, naskita en intertropikaj kolonio (R).



N-ro 62: KRUCVORTENIGMO. (laŭ la krado de n-ro 61)

Horizontale. 2. publika amuzejo (R); arbusto kun flavaj floroj (R). — 3. arbo (R). — 4. ĝi stimulas ĉevalon (R); kunfandi (R). — 5. trinkaĵo (R); prepozicio. — 6. oni bezonas ĝin antaŭ ol verŝi vinon en glason (R). — 7. Mezurunuo de pezo (R). — 8. sovaĝa besto (R); spaco apud domo (R). — 9. «Kun... plej malmola estas pli bone ol sola», diras Zamenhofa proverbo (R). — 10. frukto (R); vazeto, uzata ĉe la manĝado (R). — 11. el ĝiaj fibroj oni faras ŝtofon (R).

Vertikale. 1. pruvi (R); fanfaroni por trompi. — 2. malobservo pri ia regulo (R). — 3. dombesto (R); putra ovotio faras (R). — 5. vojaĝante, oni faras tion en hotelo (R); povanta okazi (R). — 6. birdo (R). — 7. plenkreskiĝanta knabino (R); meti ĉirkaŭ ies talion (R). — 9. ĝi situas en Ameriko (R); ĝi portas elektran kondukilon (R). — 10. laŭ ia maniero. — 11. destini, fiksi, ekz. rolon, lokon (R); restadi senmova (R).

Sendu la solvojn antaŭ la 20-4-1949 ai jenaj adresoj: S-ro Teunissen, Legmeerstr. 37.A.1. Amsterdam West: por abonantoj de Nederlanda Esperantisto. AL POSTBUS 342 (Enigmoj), BRUSSEL: por anoj de Flandra Ligo.

THIJL UILENSPIEGEL

laŭ Ch. De Coster

libere elektis kaj tradukis: Dirk

En tiuj tagoj la geŭzoj, inter kiuj Lamme kaj Uilenspiegel, prenis la urbon Gorkum. Kaj ilin komandis kapitano Marinus; tiu Marinus, antaŭe diglaboristo, ege kaj ordone teniĝis kaj, kun Caspar Turk, la defendanto de Gorkum, subskribis kapitulacan akton laŭ kiu monaĥoj, burĝoj kaj soldatoj, troviĝantaj en la citadelo, libere forlasu ĝin kun kuglo en la buŝo, la musketo sur ŝultro kaj ĉio, kion ili povas porti, escepte de la preĝejoj posedataj, kiuj apartenu al la sieĝantoj.

Sed, ordonate de la senioro de Lumey, kapitano Marinus arestis la dek tri monaĥojn kaj lasis iri la soldatojn kaj burĝojn for.

Kaj Uilenspiegel diris:

— Soldata vorto estu ora vorto. Kial li rompas la sian? La senioro de Oranĝo, nia Princo de Libereco, volas ke oni respektu havon kaj konscienliberon de kiuj fordonas sian urbon.

La maljunaj geŭzoj respondis:

— Koncerne la monaĥojn, la admiralo ne volas tion; li estas nia estro; li prenis Den Briel. En la kaĝon la monaĥoj!

— Soldata vorto estas ora vorto! Kial li rompas ĝin? Uilenspiegel respondis. En la karceron la kaptitaj monaĥoj suferos mil humiligojn.

Kiam la senioro de Lumey sidis ĉe tablo plenkovrita per vino kaj viandoj, venis kuriero el Gorkum, sendita de kapitano Marinus, kun kopio de leteroj de la Taciturno, princo de Oranĝo, «ordonantaj al ĉiuj guberniantoj de urboj kaj aliaj lokoj doni al ekleziuloj la samajn protekton, sekuron kaj privilegiojn, kiajn al la cetera popolo.»

La sendito petis ke oni konduku lin antaŭ Lumey, por propramane transdoni al li kopion de la leteroj.

La senioro de Lumey voĉlegis:

«La senioro kaj komandanto Marinus Brandt petas ke ĉiuj oficistoj, guberniestroj kaj oficiroj de la respubliko lasu senbare pasi ktp.»

Lumey pugne batis la tablon kaj, disŝirante la pasporton, li kriis:

— Anserango! en kion miksiĝas Marinus, la fuŝulo, kiu antaŭ la preno de Den Briel havis eĉ ne manĝotan fiŝosteton! Li nomas sin senioro kaj komandanto kaj sendas al mi ordonojn! Li postulas kaj ordonas! Al via mastro diru ke, ĉar li estas kapitano kaj senioro kaj scias tiel bone ordoni kaj komandi, la monaĥoj estos tuj kaj taŭge pendigataj kaj, kun ili, vi, se vi ne forrapidas.

Kaj piedbate li eligis lin el la salono.

Rembrandt, la magiisto

LA TRAGEDIO DE ARTISTA VIVO

Bonstila verko, bele eldonita kaj bindita. Kun pli ol 100 ilustraĵoj pri la verko kaj vivo de la fama pentristo.

Prezo: 5 gld.; 85 bfr. (plus sendokostoj)

Mendu ĉe via respektiva Lib.-Servo:

Flandra Esperanto-Instituto
P. van Humbeekstraat 3,
Brussel-West

Libro-Servo L.E.E.N.
Z.-O.-Singel 5,
Bergen op Zoom

— Enverŝu! li kriis. Ĉu vi rimarkis la impertinenton de tiu Marinus? Mi ja vomus mian manĝon, ja tiel mi furiozas. Oni tuj pendigu la monaĥojn en la tenejo, kaj ĉi tien la flandro, kiu pledis por ili, tuj kiam li estos ĉeestinta ilian ekzekuton. Tiam ni ja vidos ĉu li ankoraŭ kuraĝos aserti, ke mi misagis. Oni kondukis Uilenspiegel antaŭ lin.

— Nu! li diris, ĉu novaĵoj pri viaj amikoj, la monaĥoj?

— Ili pendas, Uilenspiegel diris, kaj malkuraĝa torturisto, profesie murdanta, apertis post ilia morto la ventron kaj la flankon de unu el ili, kiel ĉe buĉita porko, por vendi ĝian grason al apotekisto. Soldata vorto ne plu estas ora vorto.

— Vi spitas min, ulo tri futojn alta, sed ankaŭ vin oni pendigos, ne en tenejo, sed je via honto, sur la placo, en ĉies vido.

— Honto super vin, Uilenspiegel diris, honto super nin; soldata vorto ne plu estas ora vorto.

— Ĉu vi silentu, rigidkapo! diris la senioro de Lumey.

— Honto super nin, Uilenspiegel diris, soldata vorto ne plu estas ora vorto. Prefere punu la friponon, kiu vendas homograson.

La senioro de Lumey ĵen tiris sian sabron kaj li estus sendube mortiginta Uilenspiegel, se la senioro de Treslong ne estus reteninta lian brakon per la vortoj:

— Kompatu, li estas brava kaj firma; li ne misagis.

Ĉe tio Lumey pripensis kaj diris:

— Tiam li petu pardonon.

Sed Uilenspiegel restis rekta kaj respondis:

— Mi ne fiflatas la seniorojn: soldata vorto ne plu estas ora vorto.

— Starigu pendigilon! Lumey diris, kaj konduku lin al ĝi kaj tiam kanabo fariĝu la vorto.

— Jes, Uilenspiegel diris, kaj antaŭ la popolamaso mi elkrios: soldata vorto ne plu estas ora vorto.

Oni starigis la pendigilon sur la placo. La urbon rapide trakuris la novaĵo, ke oni pendigos Uilenspiegel, la kuraĝan geŭzon. Kaj la popolon movis kunsento kaj kompatu. Kaj amase ĝi rapidis al la placo; tien ĉevalrajdis ankaŭ la senioro de Lumey, ĉar mem li deziris doni la signon de ekzekuto.

Senemocie li rigardis kiel Uilenspiegel staris sur la ŝtupetaro, vestite por suferi la morton, en sia ĉemizo, la brakojn ligitajn sur la korpo, la manojn kunigitajn, la ŝnuron ĉirkaŭ la kolo, dum la ekzekutisto pretis eklaboru.

Treslong diris al li:

— Senioro, pardonu al li, li ne perfidis kaj neniu iam pendigos homon, tial ke li estas karaktere sincera kaj kompatema.

Kaj la viroj kaj virinoj en la amaso, kiuj aŭdis Treslong tiel paroli, elkriis:

— Kompaton, senioro, pardonon kaj kompaton por Uilenspiegel.

— Tiu rigidkapo spitis min, Lumey diris. Li pentu kaj diru ke mi agis juste.

— Ĉu vi volas penti kaj diri ke li agis juste? Treslong diris al Uilenspiegel.

— Soldata vorto ne plu estas ora vorto, Uilenspiegel respondis.

— Ĉirkaŭmetu la ŝnuron, Lumey diris.

La ekzekutisto volis obei sed knabino, tute blankvestita kaj kun florplekto en la haroj, kvazaŭ freneza saltis sur la ŝtupojn de la ekzekutejo, flugis ĉirkaŭ la kolon de Uilenspiegel kaj diris:

— Tiu viro apartenas al mi; mi prenas lin kiel edzon.

Kaj la popolo laŭte aplaudis, kaj la virinoj kriis:

— Vivu, vivu la knabino, kiu savas Uilenspiegel.

— Kio do? demandis la senioro de Lumey.

Treslong respondis:

— Laŭ kutimo kaj institucio de la Urbo estas juro kaj moro ke juna virgulino aŭ ne edziniĝinta virino povas savi de la pendigo viron, prenante lin kiel edzon ĉe la pledo de la pendigilo.

— Dio helpis lin, Lumey diris, malligu lin.

Rajdante al la pendigilo li vidis ke la knabino okupas sin tranĉante la ŝnuron de Uilenspiegel, ĉe kio la ekzekutisto volis rezisti ŝian intencion per la vortoj:

— Se vi tranĉas ilin, kiu pagos min? Sed la knabino ne respondis.

Rimarkante kiel la amo igis sin tiel tujagama kaj lerta, li estis emociata.

— Kiu estas vi? li diris.

— Mi estas Nele, lia fianĉino, ŝi diris, kaj el Flandrolando mi venis por trovi lin.

Kaj la popolo aplaudis aprobe kaj ili malaperis en La Ora Kruĉo kie granda festeno estis servata.

Kaj Uilenspiegel diris al Nele:

Dolĉamata, nun vi ja estas ĉe mi! Hura! ŝi ĉeestas korpe, kore kaj anime, mia plej kara amikino! Ho! tiuj ĝentilaj okuloj kaj tiuj belaj ruĝaj lipoj, el kiuj venis nenio alia ol vortoj de bono! Ŝi savis mian vivon, mia plej amata! Vi estos sur niaj ŝipoj la fifristo de la liberigo. Ĉu vi memoras, sed ne... Al ni apartenas ĉi tiu momento de petolo, al mi via vizaĝo, kiu dolĉas kiel la butono en junio. Mi estas en la paradizo.

Kaj venis la pastro kaj ligis Nele kaj Uilenspiegel por la vivo.

(El Thijl Uilenspiegel)

ANONCETOJ

Juna japana studento (21 j.) deziras korespondi kun belgaj kemi-studentoj kaj interŝanĝi pm.: Akira MATUKUMA 69, Katahira-mati, Sendai, JAPANUJO.

Japana studento (24 j.) deziras korespondi pri diversaj aferoj: KUSUMOTO Hazime, 16, Koami-Imagawabasi-Dōri, HUKUOKA-si, JAPANUJO.

Deziras tutmondan interŝanĝadon de poŝtmarkoj: Manuel Manteca, Templeque (Toledo) HISPANUJO.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel — Drukkerij: J. Van Laer, Korte Begijnestraat 38, Turnhout.

Wereldnieuws

Het Wereldpetitionnement aan de Verenigde Naties was op 4-2-49 getekend door of namens 14.500.000 personen. Hiervan leverden Duitsland bijna 7 miljoen, Japan bijna 2 miljoen, Tsjecho-Slowakije en Nederland ieder 1 miljoen, Britannië 750 duizend en Noorwegen 500 duizend.

U.E.A. Het totaal aantal leden van de U.E.A. bedroeg eind vorig jaar 17707 tegen 16004 eind 1947. De groei is vooral te danken aan een aanzienlijke toename van het aantal associjale leden; de categorieën M.J. en M.A. zijn echter beduidend teruggeklommen, ongetwijfeld een gevolg van de moeilijke economische en politieke verhoudingen. Zijn onze delegaties in dezen wel voldoende actief? Nog dezer dagen kon de samensteller van deze rubriek in een belangrijke conferentie de propagandische waarde van het U.E.A.-jaarboek constateren.

Canarische Eilanden. Helaas moeten we terugkomen op ons bericht in het vorige nummer. Immers, we vernemen nader, dat de decaan van de Chemische faculteit, die het initiatief genomen had tot de door ons vermelde Esperanto-cursussen en die de euvele moed had gehad, het verbod openlijk te becritiseren, door de Spaanse minister van onderwijs is ontslagen. In rond Hollands noemen we het optreden van deze minister Spaans.

Duitsland. — Berlijn bevordert officieel het Esperanto.

In het stadhuis van Berlin-Neukölln is officieel een Esperanto-informatie-bureau geopend. De taak van dit bureau is onderwijzers en leerlingen raad te geven in alle zaken Esperanto betreffende. Het verschaft inlichtingen over alle kwesties van onderwijsmethode en materiaal en verleent bemiddeling bij het oprichten van cursussen, bij buitenlandse correspondentie, vakliteratuur, enz. Het houdt regelmatig contact met het Duitse Esperanto-instituut in München en is daardoor in staat de nieuwste inlichtingen te verschaffen over de Esperanto-beweging in de hele wereld. Het adres is: Stadhuis Berlin-Neukölln, Erkstr. 28, afd. Esperanto.

Volkshogescholen. Het aantal volkshogescholen die Esperanto in het leerplan hebben opgenomen, is gestegen tot 112 (van 2 van deze wordt gemeld, dat er nog geen E.-cursus is begonnen).

Frankrijk. — De afd. Esperanto van de jaarbeurs 1948 in Lyon ontving 3230 stuks correspondentie in het E. uit 52 landen.

LA PIAN — AGORDISTO

de Erik Monck

La Sinjorino donas balon. Ŝi mendis la agordiston por ĝustigi la pianon.

Kaj li venis, kun siaj grizaj haroj, klina dorso, flavaj kavaj vangoj, tre mallarga pantalone, flikita frako kaj ĉemizo neniel blanka.

Kaj jam sonas el la salono:

Do-do-do-do.

Li pensas:

Vespere, oni ĉi tie donas balon, ĉar balon nun donas ja ĉiu.

Oni amuzos sin, ... dum en mia ĉambreto mi kopiados muzikon por la komercisto...

Re-re-re-re.

Kaj ĉe ĉi tiu piano sidos artisto, kaj liaj fingroj tiros ĉielajn melodiojn el la klavoj, kaj logos larmojn el la okuloj... Iam ankaŭ mi estis artisto, kaj ankaŭ mi muzikis: operon, simfoniojn, valsojn... sed per mia lasta, mi glufermis la fenestron kaj la opera partituro varmigis miajn manojn... Ho, tiel longe tio jam pasis!...

Mi-mi-mi-mi.

Kaj ĉi tie oni manĝos... ĉar la trufojn mi jam vidas sur la bufedo... kaj oni trinkos... la ĉampanon la servisto ĝuste portas el la kelo... Ankaŭ mi volus ĉeesti, ĉar... la tutan tagon mi havis nur akvo-gluton kaj moneran paneton... kaj pli eta ol kutime estis ĉi tiu.

Fa-fa-fa-fa.

Kaj ĉi tiu salono estos bele, ho, tiel bele luma, garnita kaj meblita, kaj la lumo brilligos la diamantojn... dum mi kaj mia patrino kaj mia fratino rigidigados ĉe la morta fajro kaj la estingita lampeto...

Sol-sol-sol-sol.

Kaj ĉi tie oni kantas, belajn, purajn kantojn, per belaj, puraj voĉoj. Tion ankaŭ mi faris iam, en la riĉaj salonoj kaj la belaj koncertejoj... sed mia voĉo tre malfortigis pro la malhavo... nun mi ne povas plu...

La-la-la-la.

Kaj la dancantaj paroj turniĝos, kaj la vanĝoj ruĝos, kaj la okuloj brilegos... tiel feliĉa mi neniam estis.

Si-si-si-si.

Kaj la junaj sinjoretoj kaj la junaj fraŭlinoj estos feliĉaj... neniam mi estis tia.

Do-do-do-do.

Bone oni amuzos sin ĉi tie... dum en mia ĉambreto mi kopiados muzikon por la komercisto...

Do-re-mi-fa-sol-la-si-do.

(Jeugdwerk)

(kun afabla permeso de la vidvino K. Van de Woestijne, trad. Hedero)